*Philadelphia.*—En la grandega magazeno de Strawbridge & Clothier Prof. Christen antaŭ ne longe donis kurson en Esperanto. La ĵurnalo redaktata de kaj por la laborantoj de tiu magazeno *Store Chat* (Magazena Babilado) raportas en sia numero de la 15<sup>a</sup> de Junio: "La unua kunveno estis la 1<sup>a</sup>an de Junio, kaj nur kvindek ok ĉeestis. Post tiam kvar kunsidoj estis okazintaj, kaj preskaŭ du cent membroj enskribitaj. Ĉu vi estas inter ili?" Prof. Christen ankaŭ instruis klason ĉe la Baldwin'a Fabriko de Lokomotivoj kaj organizis klubon. Tiel same li faris ĉe la Militŝipejo de Usono. Gratulojn al Filadelfio kaj al Prof. Christen!

# LITERATURO

## LA MANDARENO KAJ LA MALAMIKO.

Laŭ angla originalo de Flora Warren Smith  
tradukis Kenneth M. Smith.

La hina mandareno, sidanta sur la eta horloĝo de la kamenbreto en la infanejo, sendube povus preparoli tre multe interesajn rakontojn pri infanaĝaj faroj kaj adventuroj, se, ja, li povus malfermi sian buŝon por alia celo ol vasteta grimaco.

Li memoris multe, tre klare estas la rememoro—kvankam okazis antaŭ longe—pri la tago kiam ruĝvizaĝulo, kies senhara kapo kaj palpebrumantaj okuloj similigis lin al la Mandareno mem, estis portata en la delikatan ĉambreton. Je la unua rigardo el la duonfermitaj okuloj la Mandareno tremetas, kaj en sia koreto timas la novulon kiel malamiko. 77

Estis dum la juneco de la Mandareno tiam, nelonge post lia formovigo el la butikoj en kiu li kelkatempe sidis enpompe. Tiam li estis alŝikita al la horloĝo sur kiu li nun sidas kaj je ĉiu bato de l' hormezurilo lia harplekto al-kaj demoviĝis, kaj lia ridanta vizaĝo momente eĉ iĝis pliĝojema.

Nun ĉio ĉi ŝanĝis; antaŭlonge lia kunigo kun la horloĝo estis rompita per senkompataj manetoj infanaj. Delonge lia harplekto ĉesis svingadon, nun nur pendigis nesvingebla la preskaŭ senhara kapo. Sed la vasteta grimaco restis ĉiam sur lia gajplena vizaĝo, kaj lia decido por trovi ĉion bona sin montris en la oblikvaj okuloj.

La unuaj kelkaj monatoj tuj post la alveno de l' Malamiko estas preskaŭ pacemaj, sed tiel saĝa Mandareno kiel ĉi tiea ne povas malobservi signojn de lia venonta fatalo. La Malamiko lernas sidi surplanke, li trovas metodon por veturi ĉirkaŭĉambre per piedoj kaj manoj, fine, kiam li sin surlevis sur seĝon, kaj tie

staras, la Mandareno tremas, la sorto alproksimiĝas.

La morgaŭa tago la Mandareno treme aŭdis la seĝon movigitan trans la plankon. Li aŭdis la infanajn provojn por supreniri la seĝon, kaj tiam, ĵus kontraŭe antaŭ liaj okuloj, aperis la du de l' infano. Tiam maneto estis etendita, kaj terurigita Mandareno estas deprenita el lia loko sur la horloĝo. Li pensis la finon apuda, sed ĵus kiam li pensis sin disĵetigonta, iu envenis la infanejon kaj li estis liberigita.

Sed li estis savita nur por plua turmentado. Tio estis nur la komenco de serio de persekutoj, kiujn la Mandareno pacience suferis. Interne li estis rebelema, sed ekstere lia grimaco ŝajnis lin afabla.

Pli ol jaro preterpasis depost la unua vizaĝ-al-vizaĝa renkonto, kaj ĉiame aferoj plimalboniĝis. La Malamiko lernis krii "Pupo," "Pupeto," kaj tiamaniere posedigas al si la Mandarenon, por pundoj plue la sendefendan Celestulon. Pli kaj pliofte li aŭdis tiun imperian krion, kaj la Mandareno pensis lian finon baldaŭ.

Subite kaj neatendite estis prokrasto por la Mandareno. Dum du semajnoj, blanka kaj silenta, la Malamiko kuŝis en sia beleta lulilo, ne eĉ unufoje vokante por sia pupeto. Estis odoro de medicinoj en la ĉambro, kaj la doktoro en kaj eliris piedpinte, kaj parolis mallaŭte; la Mandareno surrigardis ĉion ĉi kun senĉesa rideto.

Fine, unutage estis ŝanĝo, la malgrandaj okuloj bluj malfermis kaj infana voĉtono murmuris "Puĉjo! Puĉjo!" Denove estis li prenita de sia loko kaj enmetita en la bubajn brakojn.

"Li eble plisaniĝas" diras la nutristino.

Momente la Malamiko ridetis la groteskan hinton, tiam murmurante "Puĉjo! Puĉjo!" ankoraŭ, refalis sur kap-

kuseno, premante la Mandarenon en la brakoj forte, kaj refermis la okulojn.

Longe la du senmove kuŝas kune. La sekvonla Mandareno ne povis kompreni. Kial ploregis la patrino tiel senkonsole kiam ŝi vidis ilin kune? Kiel strange, ke la Malamiko ne ekkriis kiam senigita de lia ludilo! La Mandareno ne povis kompreni, sed li ridetis tiel paciencie kaj senplende kiel ĉiam, kiam oni levis lin el la etaj infanaj brakoj kaj remetis lin sur la kamenbreton.

### LA INSULO RÉ.

Maria Posenaer, en *Belga Esperantisto*.

Unu el la plej interesaj ekskursoj farblaj dum restado en la Franca urbo La Rochelle, estas ekskurso al la insulo Ré.

La Rochelle, la fiera urbo de la Hugenotoj, starigas siajn multnombrajn antikvajn turojn, kiel honorindajn postsignojn el glora estinteco, sur gracia golfeto ĉe la bordo de la Atlantika Oceano. Sed ne pri tiu interesege urbeto mi hodiaŭ parolos. De La Rochelle du insuloj estas en la malproksimeco videblaj: norde, la insulo Ré, sude Oléron. Vaporŝipetoj faras regulan servon inter la kontinento kaj la insuloj. De La Rochelle al la insulo Ré, la marveturado daŭras proksimume du horojn; ĝi estas pli mallonga kiam oni enŝipiĝas en La Pallice, la granda komerca haveno de La Rochelle (ĉar tiu ĉi lasta estas precipe haveno por la fiŝkaptado). De La Pallice, per vaporŝipeto tute malgranda kaj nekomforta, oni marveturas dum kvarono da horo, kaj oni atingas la orientan nudan ekstremaĵon de la insulo. Tie vagonaro atendas, tiel antikva kaj senluksa kiel la vaporŝipo. En du horoj proksimume ĝi traveturas la tutan insulon, sur longo da 40 kilometroj, preterpasante multajn interesajn lokojn, inter aliaj St. Martin de Ré, La Couarde, Ars-en-Ré, Phare des Baleines. Ŝtonvojo sekvas preskaŭ la saman direkton, kaj estas multe pli agrable, multe pli interese, traveturi la insulon per kaleŝo. Tion mi faris sur granda parto de la trairado, de St. Martin ĝis Ars-en-Ré. Kaj tiu komunikilo estis ankoraŭ pli malnova, pli senmoda

kaj nekomforta ol la vagonaro. Estas kurioze, kiel, tiel proksime de la kontinento, la moroj ŝajnas malfrui minimume kvindek jarojn.

La tuta insulo estas vasta ebenaĵo, kun tre malproksima horizonto. La kulturo konsistas precipe el malaltaj vinberujoj, kaj inter la vinbertrunkoj oni kulturigas asparagojn; sed ambaŭ, vinberoj kaj asparagoj, ne estas tre bongustaj, tial ke oni sterkas la teron per ruko (varech). Tiu fuko, elĵetita el la maro kaj forblovita de la vento kovras la insulon ĝis tre antaŭe en la teroj, disvastigante karakterizan fiŝodoron; kaj saman gusteton ĝi donas al la kulturaĵoj sterkitaj per ĝi.

La marbordo sin prezentas tre diversaj. Sur granda parto, speciale sude de la insulo, etendiĝas vasta, belega sablobordo; aliparte estas ŝtonaj krutaĵoj, aŭ eĉ kelkaj sablaj montetoj kun abiaroj. Sed ĉiam la bordo estas sovaĝa, impresa; ĉiam oni vidas antaŭ si la grandan, senliman Oceanon, ĉiam oni aŭdas ĝian plendantan aŭ muĝantan voĉon. La sudokcidenta bordo estas tre danĝera por la marveturado: vastegaj rifoj sin etendas laŭ tiu bordo, la ondoj levigas ŝaŭmantaj kontraŭ ili, kaj je la forfluo oni povis ekvidi la tutan perditajn de ŝus pereinta kvarmasta velŝipo (la franca ŝipo "Gers" Aprilo, 1905). Sur unu parto de la insulo, apud Ars-en-Ré, la du marbordoj tiel alproksimiĝas la unu je la alia, ke restas nur inter ili la vojo kaj la digo; la vidaĵo estas bela: ambaŭflanke oni nur vidas la maron.

Multnombraj vilaĝoj kaj urbetoj estas dissemataj en tiu regiono kiu ŝajnas tiel izolata kaj trankvila. La ĉefurbo estas St. Martin de Ré (Sankta Martino). Ĝi estas malgranda haveno, samtempe ol fortikaĵo kun remparoj kaj citadelo. Tiu ĉi estas la malliberejo kie atendas la kondamnitaj enŝipiĝantaj al la kolonioj. Sankta Martino estas urbo sufiĉe granda, kun multetaĝaj domoj, komfortaj hoteloj, kaj eĉ kelkaj belaj magazenoj. Ĝi ankaŭ posedas ruinon de mezepoka abatejo.

En la najbaraĵo de La Couarde, oni miras trovi en la abiaroj kelkajn modernajn kampodomojn. En la vilaĝoj, la domoj estas ĉiuj tre malaltaj, senetaĝaj,

kaj senmakule kalkepentritaj. Estis je la Paskfesto kiam mi vizitis la insulon, kaj ŝajnis al mi ke ĉiuj domoj kaj dometoj vestiĝis per nova blanka paskrobo. Kaj en tiuj mallarĝaj, puregaj vilaĝstratetoj moviĝis pentrinde la blankaj kvadrataj kufoj de la insulaninoj. Generala estas ankoraŭ la uzado de la loka kapvestaĵo.

Ĉe la okcidenta ekstremaĵo de la insulo, apud danĝerega rifplena loko, starigas la altega Lumturo de la Balenoj (Phare des Baleines). Ĝi estas la plej alta el ĉiuj lumturoj de la Franca okcidenta marbordo. La turistoj supreniras la turon kaj oni povas imagi la imponantan vidaĵon kiun ili ĝuas de tie supre. (Mi malfeliĉe, pro manko da tempo, povis nur daŭrigi mian vojaĝon ĝis Ars-en-Ré, kaj ne vidis la lumturon.) Mirinda fakto estas ankaŭ ke ĉiuj turoj de la preĝejoj estas uzataj kiel gvidturoj por la fiŝkaptistoj kaj marveturistoj. La supraĵo de tiuj turoj estas je la pinto nigrita per gurdo, kaj sube blankepentrita per kalko. Tiamaniere ili estas videblaj de tre malproksime.

Nun mi nur aldonos kelkajn vortojn pri la salmarĉoj (marais salants). Per kluzoj la marakvo enfluas en vastajn malaltajn kampojn apartigitajn en fakoj. Tie oni lasas ĝin vaporigi per la suno. La marakvo demetas la salon, kaj viroj kaj virinoj starantaj sur la fakrandoj, ŝovelas tiun salon en amasoj, kaj ŝarĝas ĝin en korboj. La rikolto de la salo estas, krom la fiŝkaptado, unu el la ĉefaj okupadoj de la insulanoj, kaj la salmarĉoj estas tre multnombraj, precipe en la proksimeco de Ars-en-Ré, beleta urbeto sur la golfo de tiu nomo (mer d'Ars).

Por resumi tiun priskribeton de la insulo Ré, mi konkludas dirante ke ĝi estas vere vizitinda. Kiam oni vojaĝas en la najbaraĵo, oni nepre devas entrepreni tiun ekskurson. Tiel proksima de la kontinento, la insulo estas tamen tute malsimila. Ni miras pro ĉio, pro la simplaj moroj de ĝiaj loĝantoj, pro la kvieteco de ĝiaj domoj, pro la senlimeco de ĝia horizonto, pro la sovaĝeco de ĝiaj marbordoj. Ĉio kaptas kaj meritas nian atenton, kaj mi certigas ke mia esplor-

vojaĝo al la insulo Ré estis tiel interesplena kiel agrabla.

## SENTENCOJ EL "ASPAZIO."

Kian gravan verkon posedas Esperanto en "Aspazio," tradukita el la pola originalo de Leon Zamenhof, la Esperantistoj ne ĉiuj komprenas. Kvankam por la ordinara homo dramo ne estas tiel leginda kiel verko rakonte skribita, la multaj saĝaj kaj filozofaj diroj en "Aspazio" donas al ĝi la plej altan karakteron kaj ĝi estas el la tuta libraro Esperanta unu el la plej legindaj libroj. La sekvantaj frazojn elektis kaj publikigis en *Pola Esperantisto* Dro. Henryot:

—Mirinda estas la homo: en la filozofio li ĵetas sin, kiel infano en akvon—li iras kuraĝe antaŭen, dum la akvo estas malprofunda, sed antaŭ pli profunda li retiras sin pro la timo, ke iu droninto lin ne entrenu en abismon. Tiu-ĉi droninto estas ĉiam la logiko.

—Se homo ekatakos kaŝite kaj mortigos unu dormantan friponon—tio estas puninda krimo. Sed, se dum la milito miloj da homoj atakas kaj buĉas kelkajn milojn da dormantaj soldatoj de alia armeo—tio estas nobla merito.

—La naturo ne nomas siajn idojn, sed naskas kaj zorgas ilin sennome kaj se ĝi donas iafoje preferon al unu el ili, tiam nur al la pli forta kontraŭ la malpli forta.

—Kiam vulpo sufokas kokinon, la vulpo estas malnobla, sed kiam homo ĝin formangos—li estas nur malsata.

—Oni povas verki bonegajn tragediojn, skulpti mirindajn statuojn, oni povas esti tiel valora kaj samtempe tiel malsaĝa, kiel perlo.

—Viro por konvinki sian amatinon pri la amo havas milojn da rimedoj, sed pri sia estimo nur unu—edziĝon.

—Cervon kun ligitaj piedoj facile antaŭkuros libera azeno.

—En la spaco restas ĉiam neŝanĝebla kvanto kaj kvalito de atomoj, semoj de l' tutmondo, la materio ne transformiĝas, ĝi nur akceptas alian eksterajon.

—Se la koro ne estus necesa por la



nutrado de l' sango, oni devus ĝin el-tranĉi.

—La kalumnio sendisiĝe fluas post la granda homo, kiel ŝarko post ŝipo, ĉiam flarante akiron.

—La ridindecojn timas eĉ dioj. Senplumigita je delogaj ŝajnaĵoj malsaĝulo, fripono aŭ senkuraĝulo ree plumkovriĝos, se vi ellasos lin el la manoj sango-kovritan kaj ne ridindan. Ĉiuj makuloj bone forlaviĝas aŭ orumiĝas: riĉa infan-mortiginto povas fariĝi zorganto de orfoj, sed neniu trinkus publike pokalon da mielo kun Homero kolorigita blue.

—Zeŭso ekzistas kaj Prometeo ekzistas—neniam ili pereos kaj neniam ĉesos interbatali; ŝajnas eĉ, ke la tuta homa kredo estas entenata en tiu ĉi mito kun tiu sola diferenco, ke unuj estas adorantoj de Zeŭso, aliaj de Prometeo. Zeŭso kaj Prometeo ricevos aliajn nomojn, la ŝtonego ŝanĝiĝos en kolonon, kruĉon aŭ lignaron, sed la batalo daŭros.

—Vera genio neniam iras malantaten, kaj neniam subiĝas.

—Virinoj similas reciproke kiel citronoj, unu havas pli dikan aŭ pli maldikan haŭteton ol alia, sed ĉiuj estas acidaj kaj agacigaj. La naturo kreante ilin ne zorgis pri diverseco—ĝi faris du formojn: malbelan kaj belan, kiujn ĝi laŭvice plenigas per miksaĵo de hipokriteco, malico kaj malnoblaĵ voluptoj. Ifoje ĝi eraras kaj enmetas en ĉi tiujn formojn materialon viran, preparitan el pli perfektaj elementoj—kaj tiam aperas Safo, Aspazio aŭ iu ajn alia eraro de l' naturo.

—Ordinare, kiu prenas edzinon, kaptas kaj hejmigas sovaĝan anason, kiu forkuras de li en najbaran marĉon, kiam li pensis, ke ĝi ekamis lian puran lageton.

—Viro tiel longe povas konfidi al virino, kiel longe ŝi kun siaj konkurantinoj batalas pro li.

—Por la tuta homaro la mondo estas malnova, nereguligita maŝino, rompanta senĉese siajn radetojn, maŝino, kiun plibonigi oni ne povas, ĉar ĝi de la komenco estis malbone konstruita. La plej mankohava ĝia risorto estas virino, kiu per sia perfida amo kvazaŭ per rustaĵo trapenetas plej malmolajn virajn korojn.

—Inter ĉiuj donacoj de l' naturo kaj akiraĵoj, kiujn ekposedis viro, neniun li

tiel malbonuzis, kiel virinon. Li agis kun ŝi pli malnoble, ol kun la tero, kies fruktodonecon li pligrandigis, ol kun la arboj, kies fruktojn li perfektigis, ol kun la bestoj, kiujn li en arbaroj kaptis kaj kreskigis, ĉar li ne sole ekspluatis ŝian laboron, sed malakrigis ŝian spiriton kaj malĉastigis ŝiajn sentojn. Nia inokulita pomarbo pli superas la sovaĝan, ol la civilizita virino—la barbaran. Viro konsumis mem la bonaĵojn de l' progreso, al virino li donis apenaŭ almozon; li iris antaŭen, kiel senkompata avarulo kaj ŝi post li, kiel humila almozulino. En tiu ĉi humiligado ŝi perdis la plej noblajn instinktojn kaj disvolvis tiujn, kiuj faris ŝian malliberecon pli tolerebla.

—Homoj konstante plenigas per sablo truajn sakojn aŭ plenblovas per vento vezikojn kaj kliniĝas sub ili, kvazaŭ ili portus grandegajn ŝarĝojn.

—Hodiaŭa vero povas morgaŭ fariĝi falso.

—Mensogo estas venena agariko kaj superstiĉo vermoplena fungo—filozofo devas ilin forĵetadi el la korboj de homoj malkleraj por ke tiuj lastaj ne malŝanigu morale.

—Al la virto kondukas vojo tra la scienco. Krimulo estas ne klera aŭ malbone rezonanta malsaĝulo.

—Ĉevalo humile portas kaj trenas plej grandajn ŝarĝojn, sed ektiklita de iu en incitebla loko, ĝi piedfrapas kaj mortigas sian mastron, kvankam tiu ĉi ĝin nutris kaj ne batis.

—Ordinare homo ekscias aŭ ekmemoras pri iu ajn sia organo nur tiam, kiam ĝi ekdoloras.

—La voĉo de homaj deziroj estas la plej mallaŭta inter ĉiuj, kiuj sonas en naturo, ĉar ĝi alflugas apenaŭ ĝis la oreloj de proksime starantaj amikoj. Ekster ili ĝi silentiĝas aŭ rezonas ne pli laŭte ol la bruo de cedraj pingloj.

—Azeno, tirante veturilon kun peŝo ne haltas antaŭ saĝulo trapasanta ĝian vojon.

—Kankro perdiĝinta sur granda ofte traveturata vojo ne estas malpli certa pri sia vivo, ol plej glora homo gardata de ĉiuj leĝoj.

—La piaj mortigistoj buĉas per sanktaj tranĉiloj.

—Historio havas por rakontado tiom da krimoj, ke dezirante ilin forkaŝi, ĝi devus tute eksilenti pri la homara vivo.

—Pli da homoj genufleksas antaŭ vipo, ol antaŭ genia verko.

—Malbonecon dormigas nur timo.

—Kiu rapide veturas, post tiu hundoj plej forte bojas.

—Sur la ŝtupoj de l' trono de Zeŭso efektive sidas la diino Dike, kiu raportas al sia patro pri ĉiuj neleĝaĵoj kaj li tuj kaptas tondron kaj trafas la kulpulojn, sed tio estas nur en fabelo, ĉar en la vivo li tute ne estas vengema kaj kaŝas sin antaŭ la malfeliĉuloj.

—Ĉiu estas malbona nur pro nesciado.

—Kapro nomas brasikon bongusta kaj mielon abomena. Similaj diferencoj ekzistas ankaŭ inter homoj.

—La plej mizera homo havas konvinkon, ke lia karaktero nur ĝis ia grado povas esti atingebla de suspektoj; sur ŝtupoj pli malaltaj li estas garantiita kontraŭ ili.

—La homa lango estas kapabla plenumi ankoraŭ pli grandajn krimojn ol la mano.

—La tradicio kaj niaj regularoj vidas en pensado de virinoj pli grandan pekon ol en subĵetado de l' infanoj.

—Ĉiu popolo pistas la grandajn homojn, kiel nuksojn por eligi el ili kernojn, per kiuj ĝi nutriĝas.

—Kiam genio ekparolas al homaro, ĝi komence respondas per insulto kaj nur poste per beno.

—Malsaĝeco vagas tra vojoj jam pretaj kaj bone gardataj, la saĝeco trahakas al si vojon tra densa kaj maljuna arbaro, en kiu ĝin surfalas venenaj rampaĵoj kaj rabaj bestoj.

—La socio estas kreita por pigmeoj; grandeguloj vundas al si la fruntojn per ĝiaj malaltaj kunplektaĵoj. Por ke ili tamen ne difektu kaj ne disbatu tiun ĉi konstruaĵon, estas necese ilin faligi kaj senliberigi aŭ fortranĉi al ili la kapojn.

—La netuŝeblajn kredojn de niaj pravaĵoj ni malkas hodiaŭ kaj niajn netuŝeblajn verojn la pranepoj ankaŭ ne indulos.

## KARSTO.

Priskribo verkita de *Mavro Spicer* por *Kroata Esperantisto*.

Karston! La nomo preskaŭ nevole ekvekas prezenton de dezerteco, unuformo, senĉarmo kaj malgajeco. Oni eble pensas pri netravedebla ŝtonegaro, pri ruinoj kaj rulaĵoj, kie, ĉiun vivon fortirante, krudaj ventegoj bruadas kaj malmastruma pejzaĝo la homojn forpeladas. Nepre ne! La Karsto—precipe printempe—povas esti ankaŭ rava kaj ĉarmega! Ĝiajn malbonfamajn disŝiritajn, multeformajn ŝtonegojn, ĝiajn blankelumantajn sulkojn, fendetaĵojn, rompaĵojn kaj distritajn ruinojn kovradas miloj da plej belegaj floroj. Sed ĝia tuta beleco malkaŝiĝas en la ĉarmanta regiono de la Plitvicaj Lagoj, kiuj, plej proksime al la limo de Bosnujo, per sia ĉiam pli kaj pli majesta aspekto ĉiupase ekvekas la miron de naturamantoj.

La vojo tien estas ja malfacila, sed malgrandan ĉagrenecon kaj senteman nehavecon oni devas preni kiel neeviteblan fatalon kiu do la venontan ĝuegon estas pli multe spicumonta ol malhelponta kaj ĝenonta.

La Fiumen rapidanta vagonaro, veninte el Zagreb, la bela ĉefurbo de Kroatio, antaŭ ol ĝi atingas la plej altan punkton de Karsto, ne malproksime malantaŭ Karlovac, kie la klarega fiŝriĉa rivereto Korana enfluas en la Kulpan, kaŝas malgranda soleca stacio—Josipdol. Tie ĉi ni forlasas la vagonaron. Post ĉirkaŭ naŭhora veturado ni atingas la lagbasenon de Plitvica. Ĉirkaŭe ŝtonegoj kaj pinarbaro. Sur montetoj kaj montaj floriĉaj deklivoj viglaj paŝtistoj paŝtas ŝafaron. Ankoraŭ mallonga interspaco—kaj la lacigitaj veturilĉevaloj haltas super la lago Kozjak antaŭ la gastema hotelo, enhavanta ĉiun plej necesan komforton.

Hele brilas la suno en nian agrablan ĉambron. Ni vaste malfermas la fenestron kaj dolĉe blovetanta balzama aero plenumas la ejon, ravanta la koron, freŝante la animon. Belega, grandioza vidaĵo eksorĉas la okulon. Malsupre etendas la bluega lago Kozjak, en kies

mezo verdadas arbarigita insuleto. De la transa bordo aŭdigas sin senĉesa bruado kaj muĝado de blankege lumetajantaj akvofaloj de aliaj, multe pli altaj, el 20 ĝis 80 metra alteco ŝaŭmantaj lagoj, nome: de la lago Gradinsko kaj Jezerce. Mirinda, eble nenie videbla naturaperajo: du lagoj unu super la alia, ambaŭ enkadritaj per verdantaj en bel-ega perspektivo arbarkulisoj similaj al montkupoj. Kaj pli supre, kie la arbaro malproksimen etendas en la montaron, ĉie blankaj strioj, ellumetantaj el malhela verdaĵo: dektri lagoj, etenditaj de sudo al nordo en longeco de dekdu kilometroj,—la supraj ĉarmetaj kaj parkspecaj, la malsupraj sovaĝromantikaj kun difinita karstkaraktero.

Sur la orienta bordo troviĝas la hotelo, bela kaj vasta konstruaĵo. De tie ni antaŭ ĉio tra la Kozjak per boato vizitas la sudajn lagojn. Sur bone zorgataj promenoj ni migradas tra mirinda naturparko kun centjaraj fagoj. Nin ĉirkaŭas arbarkvieteco kaj senfina soleco. Nur birdpepado sonadas al nia orelo kaj el la malproksimeco ni aŭskultas la bruetadon kaj muĝetadon de aliaj lagoj, kies speguloj ĉiam kaj ĉiam laŭtempe multkoloro lumetadas tra la branĉaro. Subite la muĝetado fariĝas infera bruegado. Ni atingis la Galovac-falon, kiu el dek metra alteco enverŝiĝas en vastan basenon ĉirkaŭitan per malluma abiaro kaj helverda foliaro.

Preterpaŝante beletajn grotojn, kaj traitante sukajn herbejojn, kies multe koloran tapiŝon riĉege traplektadas orki-deoj, ni ekvidas la plej belan supran lagon Galovac. Lumetante kaj brilante dividiĝas la sunradioj sur ĝia nemovata supraĵo, similaj al oraj kaj arĝentaj perloj. Norde tra ŝtonega rulaĵo ŝaŭmanta akvofrapado, okcidente grandega kaskado, kaj meze, kvazaŭ en mekanika artefaraĵo, sennombraj malgrandaj faletoj.

Nimfoj kaŝataj en ĉirkaŭaj grotetoj certe aŭskultadas kaj ĝojas pri la mirego de fremdaj gegastoj, kiuj nepre ne estis atendintaj tian nepriskribeblian brilegon kaj luksegon de dia kreaĵo.

Suden paŝante ni refoje alvenas al silenta arbajo. Abia kaj pinosuproj desegnas sin akre en la blua etero, la

rosperloj milspece lumetas sur longa herbaro, ĝis ili pro kisoj de oraj ĉielradioj ekardas. Hele kaj klare nun kuŝas antaŭ ni la lago. Renverŝitaj arbgrandeguloj etendas siajn de malvarma akvo blankigitajn branĉojn sur la malprofunda bordfundo, inter kies ŝtonaro centoj da kankroj malvigle ĉirkaŭrampadas kaj trutoj vigle rapidegas.

Baldaŭ ni atingas la plej supran lagon Proscansko, kiu subakvigita en ruĝan kolorojn, sian nutraĵon ricevas el la rivero Crna Rijeka, devenanta el la ĉirkaŭ 1600 metr. alta montaro Gola Plješivica, la hejmo de lupoj kaj ursoj.

En la admirinda naturparko, ĉirkaŭanta la suprajn lagojn, ni forgesis preskaŭ tutege, ke ni estas en la Karsto. Sed irado al la malsupraj lagoj tiom pli memorigas pri ĝi. Boato nin kondukas preter la jam citita "Stefanie" insulo, kie praantikvaj murrestaĵoj rakontas pri konstruaĵoj el malproksimega roma tempo, ĝis la "Maria Dorotea"—vojo; tie ĉi ni ekvidas kvar terasforme tavoligitajn montajn lagojn. En profundega kvieteco etendas la bluega lago Milan, ĉirkaŭata de hela arbarĉonego, fendegoj, funeloj, kavaĵoj kaj kavernoj. La akvo per faloj kaj kaskadoj fortege enverŝiĝas en pli profunde kuŝantajn basenojn,—la antaŭa poezio tie ĉi fariĝas sovaĝromantika vidindaĵo, atendante la penikon de lertega pentristo.

Sur kruta vojeto oni venas al la antaŭlasta lago Kaludjerovac. Antaŭ ol ni atingas la finon, tie ĉi la naturo la multspecan scenaron refoje potencege kunigas al grandioza impresio. El alteco da 80 metroj la akvomasaĵo ĵetegas sin venturilforme per ŝaŭmanta bruegado kaj akvovaporoj per bolanta muĝado levigas en fantoma vualo. Jen sunradioj flugetas en la kavon kaj briligas milkolorajn diamantojn. Admirindaj kontraŭaĵoj! Jen kvazaŭ firmaj neĝmasoj ĵetegas sin preskaŭ vertikalaj faloj, jen kvazaŭ glata travidebla vitro arkajiĝas kaskadoj, kaj inter ili sur bruna ŝtonego sukverdaĵo foliokreskaĵoj floradas en vere artplena aranĝo!

Se ĉi ajn regiono de l' mondo, tiam tiu ĉi sorĉa da naturbelaĵoj riĉega pejzago estas kvazaŭ sortdestinata al unuagrada

aerkuracejo; kiu— se nur la jam planita fervojo estos konstruita—certe milojn da fremdlandaj gevojaĝontoj kaj mallaciĝontoj allogados. Sed ankaŭ nun ni alvokas al la tutmonda bonvenonta geesperantistaro: Venu, vidu kaj miregu!

### LAVANGOJ DE LA JUNGFRÄU.

Lau G. B. Cheever tradukis Herbert M. Scott.

Subite grandega maso da neĝo kaj glacio, per si mem monto, ŝajnas sin movi; ĝi rompiĝas de la falema plej ekstera montrando de neĝo, kie ĝi havas cent futojn da profundo, kaj dum ĝia unua falo da eble dumil futoj rompiĝas en milionojn da fragmentoj. Kiel vi unue vidas la ekflamon de malproksima artilerio nokte, poste aŭdas la bruegon, tiel ĉi tie vi povas vidi la blankan ekflamantan mason kiu majeste kliniĝas, poste aŭdi la konsternan sonogon. Nubo da polva, seka neĝo leviĝas aĉeren pro la kunfrapiĝo, formante blankan volumenon da laneca fumo, aŭ nebula lumo, el brusto kies eltondras la glacia torento je sia dua progedia falo super la rokajn remparojn. La okulo ĝin sekvas, ĉarmata, laŭ ke ĝi sin ŝovas tra la vojo kiun antaŭaj lavangoj sulkigis, ĝis ĝi venas al la rando de vasto dorso da nuda rokaĵo, eble pli ol dumil futa vertikale; tiam ĝi verŝas la tutan katarakton super la profundaĵo, kun ankoraŭ pli laŭta bruego da ehanta tondro, kun kiu nenio krom la bruoj de Niagaro en ĝia nobleco estas komparebla.

Plua falo de ankoraŭ pli da profundeco sekvas, super duan similan turet-havan rondon aŭ rifon sur la supraĵo de la monto, kun tururiga, majesta malrapideco, kaj treega krako ĉe sia kunfrapiĝo, vekante denove la resonantajn ekstondrojn. Poste la torento pluen bruegas ĝis alia malpli granda falo, ĝis ĝi fine atingas fendegon da neĝo kaj glacio. Tie ĝia irado malpli rapidas; kaj plej laste vi aŭskultas la bruegon de la falantaj fragmentoj, kiuj ekpasas for de l' vido, kun pezego, sur la fundon de la profundaĵo, por resti tie eterne.

Figuru al vi katarakton kiel tiu de Niagaro, verŝatan en ŝaŭmanta grandiozece, ne simple super krutaĵon da du-

cent futoj, sed super la intersekvajn dorsajn krutaĵojn da du aŭ tri mil, sur la faco de monto dekunu futa, kaj faladantan, krakegantan, tondrantan kun senrompa sonogo de multe pli vasta nobleco ol la sono de la plej grandioza falakvo. La bruego de la falanta maso ekaŭdiĝas momente kiam ĝi lasiĝas de la monto; ĝi verŝiĝadas kun la sono de vasta aro da flueganta akvo; poste venas la unua granda kunfrapiĝo, profundsonogo de tondroj, ekaŭdiĝanta en la trankvila aero de ĉielmezo; vi ĉesas spiri, kaj vi aŭskultas, rigardas; la ega rebrilanta maso ŝutiĝas bloke super la ĉefan krutaĵon, kaj la falo estas tiel vasta, ke ĝi produktas antaŭ la okulo tiun impreson de terura majesta malrapideco pri kiu mi parolis, kvankam ĝi estas nedube pli rapida ol Niagaro. Sed se vi vidus la falakvon de Niagaro mem deveni kvinmil futojn super vi en la menso, kaj povas neniam velki el ĝi; estas kvazaŭ vi vidus alabastran katarakton el la ĉielo. La sono estas multe pli nobla ol tiu de Niagaro, pro la antaŭa kvieteco en tiuj Alpaj solejoj. Meze de tia silento kaj soleneco, for el la brusto de tiuj gloraj, rebrilantaj formoj de l' naturo, venas tiu ventega, krakega ekstondro da sonaĵo." Se ne vian animon, per la okulo, plenigus kaj fiksus la alteco de la vizio kiel, per la sento de aŭdado, tiu de la aŭdata falsono, ŝajnas, vi dezirus kaŝi la vizageton en la manojn, kaj terenfali, kiel ĉe la voĉo de l' Eternulo.

### LA HOMO PRAHISTORIA.

Por *Eho Esperantista* verkis Prof. Marcel Finot.

Eltrovo tre grava je l'vidpunkto de la deveno de homo estis ĵus farita. Du scienculoj, abatoj Bonyssoni kaj Bardon, ĵus eltrovis, en elfosaj esploroj, kiujn ili faris apud la Chapelle-aux-Saints (Corrèze, Francujo) homajn prahistoriajn ostajojn: kranion tutan, kvankam iom difektitan, kaj membrojn suprajn kaj malsuprajn de ia homo, sed de homo al kiu oni devus doni specialan nomon, ĉar ĝi ne apartenas al la homa speco nuna, kvankam ĝi diferenciĝas je speco simia.

Oni posedas jam de longe aliajn krani-

ojn prahistoriajn: tiu de pithekanthropo, eltrovita en 1894 en Java, de Dro. Dubois, kaj kiu kaŭzis multajn disputojn pri la demando de homa deveno: ĉu ĝi estas kranio de homo aŭ de antropojda simio?; tiu de Neanderthal, trovita en 1865 en Germanujo, kaj tiuj de Spy (Belgujo) post kelkaj jaroj.

Nu, parenceco inter kranioj ŝajnas evidenta, kaj oni povas rekoni, sur tiuj kranioj, aliformiĝojn kiuj fine donis la kranion homan nunan. La kranio de pithekanthropo apartenas al terciara epoko. Ĉar nenia alia restaĵo estis eltrovita en teroj de ĉi tiu epoko, oni ne povas certigi, ke ekzistis tiam ia homa aktiveco; oni opinias, ke la silikoj ne estis tranĉitaj de homoj de terciara epoko, sed ĝiaj pecoj estis poluritaj de naturaj frotadoj inter ŝtonoj. Nur en epoko keleala, t. e. en la plej maljuna de la kvara epoko oni renkontas pruvojn de ekzisto de homo; 230,000 jaroj antaŭ J.-K., ĝi povis uzi tiujn silikojn por batalado kaj memdefendo. La muskoloj de tiu prapatro estis sufiĉe malmolaj, kaj oni opinias, ke ili estas tiaj, ke ĝi ne posedis econ de ridado; ĝi ne uzis vestojn; varmo de tero estis tiam tre forta.

Nur en epoko musteria, t. e. en epoko de glaciarioj, homo eltrovis la tranĉarton de silikoj, kiujn ĝi uzas por tranĉi felojn per kiuj ĝi sin kovras, kaj por fari pintojn por batalado. Tio ĉi okazis 170,000 jarojn antaŭ J.-K. Al tiu epoko, kiu daŭris 50,000 jaroj, apartenas sendube kranioj de Neanderthal kaj de la Chapele.

Tiuj du kranioj pravas, ke homo, jam iom civilizita, havis ankoraŭ multajn karakterojn de simio sed ĝi havis malpli da ili, ol pithekanthropo. Kiel simio, ĝi staris, ĝi havis tre dikan kranion, ĝi havis frunton treege klina, apenaŭ frunton. Mandibuloj estas longigitaj, makzelo ne havas hundodentojn; la nazo estas tre larĝa, tuta vizaĝo nete similas vizaĝon bestan. Sed ĝia kranio estas multe pli ampleksa, kaj ĝia mentono forta: tio ĉi ne ekzistas ĉe simioj. La membroj estas kurbigitaj, kaj el tiu dispono speciala oni povas dedukti certe, ke ĝi estis malpli ofte staranta ol kaŭranta aŭ sur kvar piedoj.

Per tiu eltrovo, ne nur oni povas rekoni aliformiĝojn de kranio simia ĝis kranio homa, sed oni posedas sufiĉe da sciigoj por karakterizi la homon prahistorian, mezan inter simio kaj nuna homo. Oni povas certigi, konsiderante tiujn kraniojn, ke oni posedas ostojn de homo de kvara epoko, vivanta kun mamutoj kun longaj haroj, kaj rinoceroj, kaj iaj grandaj cervoj.

---

### POEMO DE H. HEINE.

Por *Eho Esperantista esperantigis* Leo Belmont

En profundo de mizero  
Mi faladis jam—  
Min peladis sur la tero  
Kalumni', malam' . . .

Tondro super mia domo  
Ekpendigis sin,  
Sed troviĝis unu homo,  
Kiu savis min.

Nobla hom'! li donis ĉion,  
Kion havas mi,  
La malicon kaj envion  
Brave romp'is li!

Nur domaĝo! Vane provus  
Montri sin dankem' . . .  
Kisi lin mi ja ne povus:  
Tiu hom'—mi mem! . . .

---

### FRANCA.

Kuracisto estis ordoninta al malsana viro recepton, kie troviĝis la jena rimarko: *Forte skui antaŭ l'uzado*. Kiam l'edzino de la malsanulo ricevis la farmaciaĵon, sur kiu ankaŭ troviĝis skribita la sama rimarko, ŝi energie skuis—ne la medikamenton, sed la malfeliĉan pacienton; kaj regule antaŭ la trinkado ŝi ripetis ĉiujn du horojn la skuadon, kredante tiel plenumi la preskripton de la kuracisto. En la sekvanta tago, kiam ĉi tiu revenis, la paciento estis kvazaŭ mortanta. Ekstreme surprizita nia Eskulapo demandis la virinon, ĉu la medicinaĵo ne bone efikis, kaj ŝi nun respondis: "Ho ve! jes, kara sinjor' doktoro; la medicinaĵo estis eble bona, sed la skuadon li ne povis toleri."

# PAĜO MALSERIOZA

## HUMORAĴOJ INTERNACIAJ.

La sekvanta kolekto estas elĉerpita el *La Spritulo*, monata gazeto por sprito kaj humoro (Jarabono 2.40 markoj, adreso Richard Bresch, Kornerstrato 31, Leipzig, Germanujo). Pro tio, ke bona ŝerco estas rapida vojaĝanto, oni ne povas ĵuri ke ĉiu naskiĝis en tiu lando, sub kies nomo ĝi aperas.

### ANGLA.

*Si*: Tiu paro de gejunuloj ŝajnas tre bone konsentiĝi. Ĉu ili estas edziĝintaj?

*Li*: Jes, sed ne kune.

### GERMANA.

*La kuzo*: Jes kara kuzino, mi edziĝus volonte kun via amikino, sed ŝi estas tro malprudenta.

*La kuzino*: Vi estas prava; vi devas edziĝi kun knabino, kiu havas prudenton por du.

### AŬSTRA.

*Filino*: Ho, patrinjo, kia ofendo!

*Patrino*: Kio okazis, kara infano?

*Filino*: Pripensu nur, mia iama fianĉo ĵus resendis mian fotografaĵon kaj nomas ĝin "specimeno sen valoro."

### BULGARA.

*La juĝisto*: Kulpigato, kiom da sakoj da terpomoj vi ŝtelis de l' ĝardenisto?

*La kulpigato*: Sep! lunde 3 kaj marde 2.

*La juĝisto*: Do vi estas ŝtelinta nur 5.

*La kulpigato*: La aliajn 2 mi intencas ŝteli tiuĉivespere . . .

### FINNA.

Instruistino: Do, miaj infanoj, per la okuloj ni vidas. Diru nun Johano, kion oni faradas per la nazo?

Johno: Per la nazo oni portadas okulvitrojn.

## AMERIKA.

Dommastrino diris al sia servistino: "Mi timas ke mi neniam povos lernigi ion al vi, *Maggie*. Ĉu vi ne scias ke vi ĉiam devas enmanigi al mi leterojn kaj kartojn sur prezent-telero?"

"Certege mi tion scias," respondis la servistino, "sed mi ne sciis ke vi ankaŭ scias ĝin."

## SERBA.

La imperiestro Nikolao I, vojaĝante tra Rusujo, en ĉiuj lokoj, kien li venis, eniris la preĝejon. En unu vilaĝo salutis lin pastro per tre mallonga parolo. La imperiestro ekmiris al tiu mallonga diro, kaj diris al la pastro: "ripetu, via pastra moŝto." La pastro ripetis sian parolon. La imperiestro elirante la preĝejon donacis al la pastro 100 rublojn. La pastro diris al la imperiestro: "ripetu, via imperiestra moŝto." La imperiestro ridis kaj ripetis kun dua cento.

## POLA.

"Jes, mia amiko, mi jam estis edziĝonta kun la grafino, kiam mi eksciis, ke ŝi pagas jare tridek mil spesilojn al sia kudristino por la vestoj."

"Nu, kaj vi?"

"Mi edziĝis kun la kudristino."

## RUSA.

*Sinjorino*: Ĉu vi deziras ricevi atenton? Mi devas vin antaŭsciigi, ke ĝi tute ne estos bona . . .

*Cambristino*: Volu nur skribi en ĝi, ke mi servis ĉe vi tri monatojn; tio-ĉi estos plej bona rekomendo . . .

## ESPERANTA.

En Esperanto ekzistas la vortoj: piedo, ŝtrumpo, boto, galoŝo; sed la tri lastaj ŝajnas esti superflujaj, ĉar oni povus anstataŭi la lastajn tri per: piedingo, piedingingo kaj piedingingo. Ĉu ne vere?

## SVISA.

Antaŭ la pordego de lernejo staras malgranda laktveturilo, al kiu estas jungita azeno. Kelkaj lernantoj incitas kaj kolerigas la beston. Ĝi maltrankviligas: kelke da laktpotoj falas teren, la enhavo plenigas la trotuaron. Furiozege almarŝas la laktvendisto donante vangfrapojn dekstren kaj maldekstren. Unu el ili ricevas knabo, kiu estis senkulpa rigardanto de la petola sceno. La bedaŭrinda bubeto plorante frotas sian vangon kaj volas iregi al la direktoro por plendi sian suferon. Sed ĉar la doloroj pri la ricevita vangfrapo okupas lian tutan atentecon, ĉe la ŝtuparo li puŝas per la kapo en la ventron de l' instruisto, kiu ĵus malsupreniris la ŝtuparon. Klak—kaj li estis feliĉa ricevinto de dua vangfrapo. Kriegante li atingas la ĉambron de la direktoro. Ploreante li diras: "Mi petas . . . la sinjoro instruisto estis donanta al mi vangfrapon kaj . . . mi, mi ja al la azeno nenion faris." Kompreneble donis la direktoro al la "impertinenta" lernanto fortan vangfrapon. Faras do tri vangfrapojn, kiujn ricevis senkulpulo, ĉar liaj amikoj incitis azenon.

## KROATA.

*Universitata profesoro:* Sed vi ne vizitis miajn antaŭleĝojn.

*Studento:* Tamen, sinjoro profesoro, mi ĉiam staris malantaŭ la kolono dum viaj antaŭleĝoj.

*Prof.:* Honto! Vi estas hodiaŭ la kvindekkvina kiu al mi diras la samon.

## ORIENTA.

Dum vojaĝo tra la Sudaj Ŝtatoj de Usono antaŭ ne longe, *Wu-Ting-Fang*, la ĥina ambasadoro ĉe "*Washington*," tre rimarkis, ke la plej granda parto de ĉia laboro, en unu el la vizititaj urboj, estis farata de nigruloj. Kien ajn la tiea komitato kondukis lin, ĉu al fabriko, al butikoj, al apudurba plantejo, ĉia la plej malfacila laboro estis farata de nigruloj. La ambasadoro *Wu* tiam neniion diris, sed vespere kiam li ĉeestis honoran balon kaj observadis la dancadon kaj valsadon, li rimarkigis al sia gastiganto: "Kial vi ne igas la nigrulojn, ke ili faru tion ĉi por vi ankaŭ."

## JUSTECO.

El angla lingvo tradukis *Laura G. Moore*. Dum domorabisto estis penanta grimpi en domon de urbano de fremda urbo, la trabajo de la duaetaĝa fenestro kiun li premis rompiĝis, kaj li falis kaj rompis al si la kruron. Lamante antaŭ juĝisto la sekvantan tagon, li indigne postulis ke la posedanto de la domo estu punata.

"Vi havos justecon," diris la juĝisto.

La posedanto veninte diris ke la malbona lignaĵo estas kulpa pro la malfeliĉo, kaj ke la ĉarpentisto anstataŭ li estas respondeca.

"Tio ŝajnas rezona," diris la juĝisto; "ordonu ke la ĉarpentisto venu."

La ĉarpentisto konsentis ke la fenestro estas difekta. "Sed kiel mi povus fari pli bone," diris li, "tial ke la mason-konstruaĵo ne estas rekta?"

"Kompreneble," respondis la juĝisto, kaj li sendis por la masonisto.

La masonisto ne povis nei ke la mason-konstruaĵo ĉirkaŭ la fenestro estas malrekta. Li klarigis ke dum li estis metanta ĝin en la lokon, lia atento estis distrata de lia laboro per beleta knabino portanto blua vestaĵo kiu preterpasis sur la alia flanko de la strato.

"Sekve vi estas senkulpa," diris la juĝisto kaj li sendis por la knabino.

"Mi konfesas," diris ŝi, "ke mi estas beleta, sed pro tio mi ne estas kulpa; se la blua vestaĵo altiris la atenton de la masonisto la kolorigisto anstataŭ mi estas respondeca."

"Tio estas bona logiko," diris la juĝisto; "la kolorigisto estu vokata."

La kolorigisto venis kaj konfesis ke li estas kulpa.

"Prenu la kanajlon," diris la juĝisto al la rabisto, "kaj pendigu lin en lia propra pordo."

La popolo laŭdis ĉi-tiun saĝan juĝon kaj forrapidis por efektiviĝi ĝin. Baldaŭ ili revenis kaj raportis ke la kolorigisto estas tro granda por esti pendigata en sia pordo.

"Trovu malgrandan kolorigiston kaj pendigu lin anstataŭ," diris la juĝisto kun oscedo; "justeco estu farata je ia kosto!"

# LA ESPERO

Himno Esperantista


*Movo de milita marso.*



1. En la mond - on ven - is nov - a
2. Sub la sankt - a sign - o de l'Es -
3. Sur neŭ - tral - a lingv - a fun - da -



sent - o, tra la mond - o ir - as fort - a vok - o; perflug -  
per - o, kolekt - ig - as pac - aj ba - tal - ant - oĵ, kaj ra -  
ment - o, kom - pre - nant - e u - nu la a - li - an la po -



il - oĵ de fa - cil - a vent - o nun de lok - oflug - u ĝi al  
pid - e kresk - as la a - fer - o per la - bor - o de la Es - per  
pol - oĵ far - os en kon - sent - o u - nu grand - an rond - on fa - mi




lok - o. Ne al glav - o sang - on so - i fant - a ĝi la  
ant - oĵ. Fort - e star - as mur - oĵ de mil - jar - oĵ in - ter  
li - an. Ni - a di - li - gent - a kole - gar - o en la

*Fortigante.*



hom - an tir - as fa - mi - li - on: Al la mond' e - tern - e mi - lit -  
la po - pol - oĵ di - vid - it - aj, Sed dis - salt - os la obs - tin - aj  
bor - o pac - a ne lac - ig - os, Ĝis la bel - a song - o de l'Hom -

*La trian fojon iru al signo ⊕*



ant - a Ĝi pro - mes - as Sankt - an har - mo - ni - on.  
bar - oĵ per la Sankt - a Am - o dis - bat - it - aj.  
ar - o por e -



ter - na ben' e - fek - tiv - ig - os.

Kun afabia permeso de la eldonisto, A. Fjodorov, Nikitskaja, Moskovo, Rusujo.



## EL TRANS LA MARO

**General Progress.**—The formation of eighty new groups between April 5 and May 5, is reported by the Centra Oficejo. This shows a continual healthy progress, and while of course, the disintegration of many groups and clubs is not reported, it is also certain that many are in active existence unknown to the Centra Oficejo. Three new periodicals are reported for the month, bringing up the total to eighty-nine. Many of these are in themselves of little practical consequence, but the same is true of periodicals in all languages, and their very existence constitutes a strong testimony to the vitality of Esperanto. With well-attended and enthusiastic national conventions in many countries this year, and a coming international convention which is receiving the support of high Spanish officials, including the king, the visible evidences of the growth of Esperanto are more convincing and gratifying than ever before.

**India.**—The *British Esperantist* reports that a new club has been founded at Tiruvalla by J. T. Jesudhasan, superintendent of the local high school.

**Denmark.**—In Vejle an Esperanto convention was attended by two hundred and fifty persons. A convention is to be held at Aarhus. In an annual competitive parade of "floats" for the benefit of a children's charity, "Esperanto" was prominently represented. One enthusiast manufactures "Esperanto" soap and candles.

**Japan.**—The Japanese Esperanto Society maintains a membership of about one thousand, and two monthly journals devoted to literature, reflect the strength of the movement for Esperanto among the Japanese. *Samideano Oisumonata*, formerly mimeographed, is now printed in a larger form.

**New Zealand.**—Esperanto classes are being taught at Wellington, Auckland and Wanganui.

**Australia.**—Melbourne has a lively Esperanto group, and a musical member has recently published two Esperanto songs.

**Natal.**—According to the *British Esperantist*, this colony has a strong Esperanto club at Durban, secretary J. Dusart. For a year the free lessons have been well attended and the members carry on much foreign correspondence.

**Belgium.**—A national Esperanto congress was held in Verviers, June 27. The "Vooruit," a local commercial society of Antwerp, pub-

